

# Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaudon la 8-an de marto 2022 per Zoom

## Ĉeestis

Bård Hekland, Claude Rouget, Marianne Lund kaj Vidar Skretting.

### 1. Aprobo de la tagordo

Ni aprobis la tagordon.

### 2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 18-an de januaro 2022

La protokolo de la pasinta kunveno jam aprobiĝis rete. Neniu komento.

### 3. Landa kongreso 2022

Espen Stranger-Johansen konfirmis sian kontribuon al la programo. Bård finfaros la detalan programon.

Kvankam la estraro elektiĝis por du jaroj, ni atentigu la elektan komisionon pri la landa kunveno.

### 4. Statutŝanĝoj

La estraro proponu nur unu statutŝanĝon: novan vortumon, kiu permesos elekti pli malmultnombran estraron. Aliaj statutŝanĝaj proponoj de la estraro (ekzemple, celantaj plisimpligon) atendu la venontan, fizikan landan kunvenon por eviti tro longajn, temporabajn diskutojn rete.

### 5. Reta instruado

Marianne informis pri la kvarvespera, reta kurso por komencantoj. La tri unuajn fojojn partoprenis 9, 11 kaj 7 personoj. La kurso okazas sen lernolibro. La ekranaj notoj de la retaj lecionoj sendiĝas al la kursanoj post ĉiu fojo. Amelie Matt partoprenas kiel helpanto kaj faras belajn grafikaĵojn. Ni decidis organizi kvarfojan daŭrigan kurson ekde la 16-a de marto se almenaŭ 3-4 personoj tion deziras.

### 6. Jarraporto por 2021

Ni diskutis, ĉu ŝanĝi la formaton de la jarraporto al pli simpla. Tamen ni decidis konservi la nunan formaton, almenaŭ ĉi-foje. Uzo de la sama formato de jaro al jaro permesas facile kompari la evoluon de la agado. La jarraporto estu preta por apero en Norvega Esperantisto, do ŝanĝoj estu faritaj antaŭ la limdato fine de marto.

### 7. Skandinava kongreso 2022

Estos programo en Oslo 9.00-14.00. Bård gvidos ekskurson en la urbocentro. Ĉu eblus venigi junajn osloanojn? Prelegos Otto, Orlando kaj aliaj. Ni atendas 5-10 norvegajn partoprenantojn.

### 8. Vigligado de NJE

Prokrastita.

### 9. Eventualaĵoj

\*Vizitoj de Lars kaj Bård al Esperantonia - Bård mallonge rakontis pri sia vizito.

\*Ĉu peti monon de Legaco Uhlen – diskuttemo por posta kunveno? – Prokrastita.

### 17. Venonta estrara interkonsiliĝo

La venonta estrara interkonsiliĝo okazu en la dua parto de aprilo.

Protokolis Marianne Lund